

15 KAZO DE SELVIN

"Hm, mia plej granda sukceso, nome sukceso, kiu kaŭzis al mi plej grandan ĝojon," rememoris maljuna majstro Leonardo Unden, granda poeto, laŭreato de Nobel-premio kaj tiel plu. "Junaj amikoj, en mia aĝo onin jam ne impresas la laŭroj, ovacioj, amatinoj kaj aliaj tiaj sensencajoj, nome kiam ili estas jam delonge for. Dum oni estas junaj, oni ĝojas pro ĉio, kaj oni estus azeno, se oni tion ne farus; sed dum oni estas junaj, oni ne havas rimedojn, por ĝoji pro io. La vivo prefere devus pasi inverse; unue oni devus esti maljuna kaj fari valoran kaj meritindan laboron, ĉar por io alia oni ne taŭgas; nur je la fino oni devus atingi la junecon por uzadi la fruktojn de sia longa vivo.

Vidu do oldulon, jam li ekbabilis. Pri kio mi volis paroli? Aha, kio estis mia plej granda sukceso. Aŭskultu, ĝi estis neniu el miaj dramoj kaj neniu el miaj libroj - kvankam estis tempo, kiam miaj libroj estis efektive legataj; mia plej granda sukceso estis kazo de Selvin. Nu memkomprene, jam eĉ vi ne scias bone, pri kio temis; nun jam pasis de tiam dudek ses, aŭ ne, dudek naŭ jaroj.

Jam estas do dudek naŭ jaroj, kiam iun dian tagon venis al mi ia blankhara, eta sinjorino en nigra vesto; kaj antaŭ ol mi povis demandi ŝin per mia tiam tre aprezata afableco, kion ŝi verdire volas, bum, ŝi genuis antaŭ mi sur la tero kaj ekploris; mi ne scias, mi ne povas vidi plorantan virinon.

"Sinjoro," diris tiu panjo, kiam mi tankviligis ŝin ion, "vi estas poeto; pro via amo al homo mi perjurias vin, savu mian filon! Certe vi legis en ĵurnalo pri kazo de Frank Selvin -" Mi opinias, ke tiam mi aspektis kiel barba suĉinfano; mi legis tamen ĵurnalojn, sed mi rimarkis neniu kazon de Frank Selvin.

Do laŭ kiom mi komprenis ŝin dum la plorego kaj ĝemado, la afero estis jena:

15 PŘÍPAD SELVINŮV

"Hm, můj největší úspěch, totiž úspěch, který mně udělal největší radost –," vzpomínal starý mistr Leonard Unden, veliký básník, laureát Nobelovy ceny a tak dále. "Mladí přátelé, v mému věku už člověk nedá na ty vavříny, ovace, milenky a jiné takové nesmysly, jmenovitě když už jsou dávno tytam. Pokud je člověk mladý, těší se ze všeho, a byl by osel, kdyby to nedělal; jenže dokud je mladý, nemá na to, aby se z něčeho těsil. Vlastně by měl život postupovat obráceně; nejdřív by měl být člověk stár a dělat plnou a záslužnou práci, protože se k jinému nehodí; teprve nakonec by měl dospět mladosti, aby užíval plodů svého dlouhého života.

Tak vidíte starce, už se zapovídá. O čem jsem to chtěl mluvit? Aha, co byl můj největší úspěch. Poslouchejte, to nebylo žádné z mých dramat a žádná z mých knížek – ačkoliv byl čas, kdy se mé knížky opravdu četly; můj největší úspěch byl případ Selvinův. Nu ovšem, vy už ani dobře nevíte, oč šlo; vždyť už je tomu dvacet šest, nebo ne, dvacet devět let.

Tedy je tomu dvacet devět let, co jednoho božího dne ke mně přišla taková bělovlásá, droboučká paní v černých šatech; a dříve než jsem se jí mohl se svou tehdy velmi oceňovanou přívětivostí zeptat, co vlastně chce, bums, klečela přede mnou na zemi a dala se do pláče; já nevím, já vám nemohu vidět ženskou plakat.

Pane, řekla ta maminka, když jsem ji trochu upokojil, vy jste básník; pro vaši lásku k člověku vás zapřísahám, zachraňte mého syna! Jistě jste četl v novinách o případu Franka Selvina – Myslím, že jsem tehdy vypadal asi jako vousaté nemluvně; četl jsem sice noviny, ale žádného případu Franka Selvina jsem si nevšiml.

Tedy pokud jsem jí v tom štkání a kvílení rozuměl, byla věc ta:

šia solfilo, dudekdujara Frank Selvin, jus estis kondamnita al dumviva peza karcero, ĉar laŭdire en rabintenco li murdis sian onklidon Sofię; antaŭ okuloj de la asiza tribunalo estis plipeziganta cirkonstanco, ke li ne konfesis sian agon.

"Ja li estas senkulpa, sinjoro," lamentis sinjorino Selvin, "mi juras al vi, ke li estas senkulpa! Tiun malfeliĉan vesperon li diris al mi: 'Panjo, mi havas kapdoloron, mi iros promeni ekster la urbo.' Sinjoro, tial li ne povas pruvi sian alibion! Kiu rimarkas nokte junan knabon, eĉ se oni lin hazarde renkontus? Mia Frančjo estis iom facilanima knabo; sed ankaŭ vi estis juna; konsideru, sinjoro, ke li havas nur dudek du jarojn! Ĉu estas eble tiel ruinigi vivon de la juna homo?" Kaj tiel plu.

Aǔskultu, se vi vidus tiun deprimitan blankharan panjon, vi ekkonus, kion tiam mi ekkonis: ke unu el la plej teruraj suferoj estas la senpova kompato. Nu, kion mi rakontu al vi: fine mi juris al ŝi, ke mi disponigos ĉion, kaj ne ĉesos, ĝis mi faros la aferon klara; kaj ke mi kredas je la senkulpeco de ŝia filo. Por tiu vorto ŝi volis kisi miajn manojn. Kiam la olda povrulino min benis, preskaŭ mi mem genuus antaŭ ŝin. Vi scias, kian stultan vizaĝon faras homo, kiam iu tiel dankas al li kiel al Disinjoro.

Bone, do ekde tiu tempo mi konsideris kazon de Frank Selvin mia afero. Unue memkomprene mi trastudis aktojn de la proceso. Aǔdu, tiom fušfaritan proceson dum mia vivo mi ne vidis; tio estis simple justica skandalo. La kazo estis fakte tute simpla: Iun nokton aǔdis servistino de la koncerna onklino Sofia, iu Anna Solarová, spirite minuseca, kvindekjara, ke iu promenas ĉe la fraŭlineto, nome ĉe onklino Sofia, tra la ĉambro. Ŝi iris do rigardi, kial la fraŭlineto ne dormas, kaj veninte en la dormoĉambron, ŝi vidis dismalfermitan fenestron kaj kiel iu vira staturo saltas de sur la fenestro en ĝardenon. Tiam tiu ino faris teruran krion; kaj kiam venis najbaroj kun lumo, ili trovis sur la tero fraŭlinon Sofia strangolitan per ŝia propra mantuko;

její jediný syn, dvaadvacetiletý Frank Selvin, byl právě odsouzen doživotně do těžkého žaláře, protože prý v loupežném úmyslu zavraždil svou tetu Sofii; v očích poroty bylo přitěžující okolnosti, že se k svému činu nepřiznal.

"Vždyť on je nevinen, pane," úpěla paní Selvinová, "já vám přísahám, že je nevinen! Toho nešťastného večera mi řekl: Maminko, mě bolí hlava, já se půjdou projít za město. Pane, proto nemůže dokázat své alibi! Kdopak si v noci všimne mladého hochu, i kdyby ho náhodou potkal? Můj Frantík byl trochu lehkomyslný chlapec; ale vy jste byl také mlad; považte, pane, že mu je teprve dvaadvacet let! Copak je možné takhle zničit celý život mladého člověka?" A tak dále.

Poslyšte, kdybyste viděli tu zlomenou bělovlasou maminku, tak byste poznali, co jsem tehdy poznal já: že jedno z nejstrašnějších utrpení je bezmocná soustrast. Nu, co vám budu povídат: nakonec jsem jí přísahal, že vynaložím všechno a nepřestanu, dokud v té věci nezjednám jasno; a že věřím v nevinu jejího syna. Za to slovo mně chtěla líbat ruce. Když mně chudák stará žehnala, byl bych málem sám před ní klekl. To víte, jak hloupý obličej dělá člověk, když mu někdo tak děkuje jako pánu bohu.

Dobrá, tedy od té chvíle jsem udělal případ Franka Selvina svou věcí. Nejdřív jsem ovšem prostudoval akta procesu. Poslouchejte, tak šlampácký proces jsem jakživ neviděl; to byl prostě justiční skandál. Případ byl vlastně docela jednoduchý: Jedně noci slyšela služka dotyčné tety Sofie, nějaká Anna Solarová, duševně méněcenná, padesátiletá, že někdo chodí u slečinky, totiž u tety Sofie, po pokoji. Šla se tedy podívat, proč slečinka nespí, a když vešla do ložnice, viděla okno dokořán a jak nějaká mužská postava skáče z okna do zahrady. Tu ta ženská ztropila děsný křik; a když přišli sousedé se světlem, našli na zemi slečnu Sofii uškrcenou jejím vlastním ručníkem;

komodo, kie ŝi kaŝadis sian monon, estis malfermita kaj tolaĝo parte eljetita; la mono tie restis - versimile tiumomente la servistino la murdinton surprizis.

Do tio estis la materialo de faktoj. La sekvintan tagon oni arestis Frankon Selvin. La servistino nome depoziciis, ke ŝi ekkonis la junan sinjoron saltanta el la fenestro. Estis konstatite, ke tiuhore li ne estis hejme: li revenis hejmen proksimume duonhoron poste kaj tuj enlitiĝis. Plue montriĝis, ke tiu stulta bubo havis iajn ŝuldojn. Plue troviĝis klaĉulino grave depoziciinta, ke kelkajn tagojn antaŭ la murdo onklino Sofia ion konfidis al ŝi: laŭdire estis ĉe ŝi nevo Frank kun peto pri pruntedono de kelkaj centoj; kiam ŝi rifuzis - ŝi estis nome terure avara - Frank onidire deklaris: Onklino, atendu, io okazos, la mondo gapos. -

Do jen ĉio, kio koncernis Frankon. Kaj nun konsideru la proceson: ĝi daŭris entute duontagon. Frank Selvin simple asertis, ke li estas senkulpa, ke li promenis, poste iris rekte hejmen kaj dormis. Neniu el la atestantoj estis submetita al kruca enketado.

Advokato de Frank - memkompreneble ofice disponigita, ĉar sinjorino Selvinova ne havis monon por pli bona advokato - estis tia maljuna bonulo kaj idioto, kiu limiĝis je tio, ke li atentigadis pri la juneco de sia senpripensa kliento kaj okullarme petis la grandanimajn asizanojn pri indulgo. Ankaŭ la prokuroro nemulte klopojis; li tondris je la asizanoj, ke ĵus antaŭ la proceso de Frank Selvin ili eldiris du liberigajn verdiktojn; kien falegas la homa socio, se ĉiu krimo trovus protekton en libermora bonvolo kaj modereco de popolaj jugantoj? - Sajnas do, ke la asizanoj ĉi tiun argumenton agnoskis kaj volis montri, ke oni ne darfus peki kontraŭ ilia bonvolo kaj modereco; simple ili decidis per dek unu voĉoj, ke Frank Selvin estas kulpa pri krimo de murdo. Jen, tio estas la tuta kazo.

Aŭskultu, kiam mi estis konstatanta ĉi aferojn, mi estis sincere malfeliĉa; en mi ĉio bolis, kvankam mi ne estas juristo aŭ eble ĝuste tial, ĉar mi ne estas juristo.

prádelník, kde schovala své peníze, byl otevřen a prádlo zčasti vyházeno; peníze tam zůstaly – patrně v tu chvíli služka vraha vyrušila.

To byla tedy materia facti. Druhého dne byl zatčen Frank Selvin. Ta služka totiž vypověděla, že poznala mladého pána, když skákal z okna. Bylo zjištěno, že v tu hodinu nebyl doma: vrátil se domů asi za půl hodiny potom a šel rovnou do postele. Dále vyšlo najevo, že ten hloupý kluk měl nějaké dluhy. Dále se našla klepna, která důležitě vypověděla, že se jí nějaký den před vraždou teta Sofi s něčím svěřila: prý byl u ní synovec Frank s prosíkem, aby mu půjčila pár stovek; když odmítla – byla totiž strašně lakomá –, řekl prý Frank: Teto, dejte si pozor, něco se stane, to bude svět koukat. –

Tedy to bylo všechno, pokud se týkalo Franka. A teď si vezměte proces: trval všeho všudy půl dne. Frank Selvin prostě tvrdil, že je nevinen, že byl na procházce, pak šel rovnou domů a spal. Žádný ze svědků nebyl podroben křížovému výslechu.

Advokát Frankův – to se rozumí ex offo, protože paní Selvinová na lepšího advokáta peníze neměla – byl takový starý dobrák a idiot, který se omezil na to, že upozorňoval na mladího svého nerozvážného klienta a se slzami v očích prosil velkodusné porotce o shovívavost. Ani státní žalobce si nedal mnoho práce; hřímal na porotce, že právě před procesem Franka Selvina vynesli dva osvobožující rozsudky; kam prý by se lidská společnost řítila, kdyby každý zločin došel ochrany v laxní blahovůli a mírnosti soudců z lidu? – Zdá se tedy, že porotci tento argument uznali a chtěli dát najevo, že se nesmí hřešit na jejich blahovůli a mírnost; prostě rozhodli jedenácti hlasy, že Frank Selvin je vinen zločinem vraždy. Tak, to byl ten celý případ.

Poslyšte, když jsem tyhle věci zjišťoval, já byl přímo zoufalý; ve mně se všechno vařilo, ačkoliv nejsem právník, nebo snad právě proto, že nejsem právník.

Nur imagu: la ĉefatestantino estas spirite malplivalora; krome si estas preskaŭ kvindekjara, do versimile en klimaktero, kio memkomprene eventuale malaltigas ŝian kredindecon. Tiun staturon en la fenestro ŝi vidis nokte; kiel pli poste mi konstatis, estis varma, sed tre malluma nokto; tiu ino eĉ ne kun proksimuma certeco povis ekkoni tiun homon. En mallumo vi distingos precize eĉ ne grandecon de homo; ĉi tion mi mem je mi funde reprovis. Kaj krome tiu ino la junan sinjoron, nome Frankon Selvin, rekte histerie malamis, ĉar laudire li mokis ŝin; li diradis al ŝi blankkubuta Heba, kion la koncerna Anna Solarová iakaŭze opiniis mortofendo.

La dua afero: Onklino Sofia malamis sian fratinon, sinjorinon Selvinová, kaj fakte unu ne parolis kun la alia; tiu maljuna virgulino povis eĉ ne trovi nomon por la panjo de Frank. Se onklino Sofia diris, ke Frank ŝin iel minacis, tio povis tute bone aparteni inter la oldvirgulinajn venenaĵojn, kiujn ŝi elpensadis por humiligi sian fratinon.

Kio koncernas Frankon, li estis meztalenta knabo; li estis skribisto en iu oficejo, havis knabinon, al kiu li skribadis sentimentalajn leterojn kaj misajn versojn, kaj enŝuldiĝis, kiel oni diras, sen propra kulpo; nome pro sentimentaleco li drinkadis. Lia panjo estis perfekta kaj povra persono, forronĝata de kancero, malriĉo kaj bedaŭro. Tiel do aspektis la aferoj de pli proksima vido.

Pa, vi ne konas tiamajn miajn junulajn jarojn; en vervimpeto mi ne sciis limojn. Tiam mi verkis por ĵurnaloj serion da artikoloj sub titolo Kazo de Frank Selvin; punkton post punkto mi montradis malfidindecon de la atestantoj, ĉefe de la ĉefatestantino; mi analizis koliziojn en la atestaĵoj kaj antaŭjuĝemon de kelkaj depozicioj; mi pruvis absurdon de tio, ke la ĉefatestantino povus ekkoni la kriminton; mi demonstris absolutan malkapablon de la juĝejestro kaj krudan demagogion en pledo de la prokuroro. Sed tio ne sufiĉis al mi;

Jen si to představte: korunní svědkyně je duševně méněcenná; nadto je jí skoro padesát let, tedy je patrně v klimaktériu, což ovšem případně snižuje její věrohodnost. Tu postavu v okně viděla v noci; jak jsem později zjistil, byla teplá, ale velmi tmavá noc; ta ženská nemohla tedy toho člověka poznat ani s přibližnou určitostí. Potmě nerozeznáte přesně ani velikost člověka; to jsem sám na sobě důkladně přezkoušel. A ještě ke všemu ta ženská mladého pána, totiž Franka Selvina, přímo hystericky nenáviděla, protože právě se jí posmíval; říkal jí totiž běloloktá Hébé, což dotyčná Anna Solarová z jakési příčiny považovala za smrtelnou urážku.

Druhá věc: Teta Sofie nenáviděla svou sestru, paní Selvinovou, a vlastně spolu nemluvily; ta stará panna nemohla přijít Frankově mamince ani na jméno. Říkala-li teta Sofie, že jí Frank nějak vyhrožoval, mohlo to docela dobře patřit mezi ty staropanenské jedovatosti, které si vymýšlela, aby ponížila svou sestru.

Pokud se týče Franka, byl to průměrně nadaný hoch; byl písárem v nějaké kanceláři, měl dívku, které psal sentimentální dopisy a špatné verše, a upadl do dluhů, jak se říká, bez vlastní viny; totiž protože se ze sentimentality ožíral. Jeho maminka byla dokonalá a ubohá osoba, sžíraná rakovinou, chudobou a lítostí. Tedy tak vypadaly věci při bližším pohledu.

Kdepak, vy neznáte má tehdejší junácká léta; když jsem byl v rázi, já jsem se necítil. Tehdy jsem napsal do novin sérii článků pod názvem Případ Franka Selvina; bod za bodem jsem ukazoval nevěrohodnost svědků, hlavně korunní svědkyně; analyzoval jsem rozpory ve svědectvích a zaujatost některých výpovědí; dokázal jsem absurdnost toho, že by korunní svědkyně mohla poznat pachatele; demonstroval jsem naprostou neschopnost předsedy soudu a hrubou demagogii plaidoyeru státního zástupce. Ale to mně nestačilo;

okupiĝante jam pri tio, mi komencis ataki la tutan justicon, la kriminalan kodon, asizan institucion, la tutan indiferentan kaj egoisman socian ordon.

Ne demandu, kian tumulton ĝi kaŭzis; tiam mi havis ian renomon, la juna mondo estis kun mi; foje vespere okazis eĉ demonstracioj antaŭ la konstruaĵo de la tribunalo. Tiam alkuris al mi la advokato de juna Selvin manplektante, kion mi faris; ke li ja prezentis kasacian plendon kaj apelacion, ke puno de Selvin certe estus moderigita je nuraj kelkaj jaroj en karcero; sed nun, ke la supera instanco ne povas cedi antaŭ teroro de strato kaj tial rifuzos ĉiujn liajn apelaciojn. Mi diris al honorinda juristo, ke ne temas ĉe mi nur pri kazo de Selvin; ke gravas por mi la vero kaj justeco.

Tiu advokato pravis; la apelacioj estis rifuzitaj, sed la prezidanto de la tribunalo estis pensiigita. Oraj homoj, nur tiam mi enmordiĝis en la aferon; vidu, ankaŭ nun mi dirus, ke ĝi estis sankta batalo por la justeco. Sciu, multaj aferoj de tiu tempo pliboniĝis; imputu al mi, maljunulo, ke en tio mi havas iom da merito. Kazo de Selvin transiris en la mondopreson; mi oratoris al laboristoj en gastejoj kaj al delegitoj de la tuta mondo en internaciaj kongresoj. 'Reĝustigu kazon de Selvin,' estis siatempe same internacia slogan kiel ekzemple 'Senarmigu' aŭ 'Votes for Women'. Kio koncernis min, ĝi estis batalo de unuopulo kontraŭ ŝtato; sed kun mi estis la juneco.

Kiam mortis panjo de Selvin, dek sep mil homoj iris post la ĉerko de tiu sekiginta kaj eta sinjorino kaj mi parolis super la malfermita tombo, kiel neniam mi parolis en mia vivo; dioscias, amikoj, terura kaj stranga afero estas la inspiro.

Sep jarojn mi gvidis la batalon; kaj tiu batalo renomigis min. Tio ne estis miaj libroj, sed kazo de Selvin, kiu akiris al mi la mondoreputacion. - Mi scias, oni nomas min Voĉo de l' Konscienco, Kavaliro de l' Vero aŭ ankoraŭ iel; io el tio estos sur mia tomboŝtono. Certe proksimume dek kvar jarojn post mia morto oni skribos en lernejaj legolibroj,

když už jsem byl v tom, začal jsem útočit na celou justici, na trestní řád, na instituci porot, na celý netečný a sobecký společenský řád.

Neptejte se, jaký z toho byl poprask; tehdy už jsem měl nějaké jméno, mladý svět stál za mnou; jednoho večera byly dokonce demonstrace před budovou soudu. Tehdy ke mně přiběhl ten advokát mladého Selvina a lomil rukama, co prý jsem to provedl; že on přece podal zmatečný stížnost a odvolání a že by Selvinův trest byl jistě snížen na nějakých pár let vězení; ale teď že vyšší instance nemůže ustoupit teroru ulice, a proto zamítne všechny jeho rekursy. Řekl jsem tomu ctihonrému právníkovi, že už mně nejde jen o Selvinův případ; že mně jde o pravdu a spravedlnost.

Ten advokát měl pravdu; rekursy byly zamítnuty, ale předseda soudu byl dán na penzi. Lidé zlatí, tehdy teprve jsem se do věci zažral; vidíte, i dnes bych řekl, že to byl svatý boj o spravedlnost. Hleděte, mnoho věcí se od té doby zlepšilo; přiznejte mně, starci, že mám na tom svůj trošek zásluhu. Selvinův případ přešel do světového tisku; řečnil jsem dělníkům v hospodách a delegátům celého světa na mezinárodních kongresech. ,Napravte Selvinův případ', to byl svého času stejně mezinárodní výkřik jako třeba ,Odzbrojte' nebo ,Votes for Women'. Pokud šlo o mne, byl to boj jedince proti státu; ale za mnou bylo mládí.

Když zemřela Selvinova maminka, sedmnáct tisíc lidí šlo za rakví té vyschlé a maličké paní, a já jsem mluvil nad otevřeným hrobem, jako jsem nemluvil nikdy v životě; bůhví, přátelé, strašná a podivná věc je inspirace.

Sedm let jsem vedl ten boj; a ten boj udělal mne. To nebyly mé knihy, ale Selvinův případ, co mně získalo to jisté světové jméno. – Já vím, říkají mně Hlas Svědomí, Rytíř Pravdy nebo jak ještě; něco z toho bude i na mém náhrobním kameni. Jistě tak nějakých čtrnáct let po mé smrti se bude ve školních čitankách psát,

kiel poeto Leonardo Unden batalis por la vero, poste ankaŭ tion forgesos.

En la sepa jaro mortis la ĉefatestantino Anna Solarová; antaŭ la morto ŝi pentis kaj plore konfesis, ke ŝarĝas ŝin la konscienco; ke tiam ĉe la tribunalo ŝi falsjuris; ke ŝi ne povas laŭvere diri, ke murdinto en la fenestro estis Frank Selvin. La bona pastro venis kun tio al mi; tiam mi havis pli bonan prudenton kiel iras la aferoj en la mondo kaj tial mi ne iris kun la afero al ĵurnaloj, sed sendis la karan paroĥestron al la tribunalo.

En unu semajno estis ordonita restituo de la proceso de Frank Selvin. Antaŭ fino de la monato staris Frank Selvin denove antaŭ la asiza tribunalo; la plej bona advokato senpage frakase nenigis la akuzon; post tio levigis prokuroro kaj rekomenidis al la asizanoj liberigi Frankon Selvin. Kaj la asizanoj decidis per dek du voĉoj, ke Frank Selvin estas senkulpa.

Jes, do tio estis la plej granda triumfo de mia vivo. Neniu sukceso donis al mi tiom absolutan kontentigon -- kaj samtempe ian senton de malpleneco; verdire, la kazo de Selvin komencis iom manki al mi - restis post ĝi ia vakuo.

Tio estis tagon post la proceso. Subite venas knabino kaj diras, ke iu homo volas paroli kun mi. Mi estas Frank Selvin, diris tiu homo kaj restis staranta en pordo; kaj al mi estis - mi ne scias, kiel diri tion al vi; mi eksentis ian senreviĝon, ke tiu mia Selvin aspektas kiel... ni diru lotagento: iom korpulenta kaj pala, kalviĝanta, ete ŝvitanta kaj ege ordinara; krome li odoris de biero.

"Via majstra moŝto," balbutis Frank Selvin (imagu, li diris al mi "via majstra moŝto!" mi estus lin piedfrapinta!) "mi venas danki al vi... kiel al mia plej granda bonfaranto." Ŝajnis, ke tion li ellernis parkere. "Al vi mi dankas por mia tuta vivo. Ĉiuj dankesprimoj estas malfortaj -" "Mi petas vin," mi rapidis diri al li, "tio estis mia devo, estinte foje certa, ke oni kondamnis vin senkulpe." Frank Selvin kapskuis.

jak básník Leonard Unden bojoval za pravdu; pak se i na to zapomene.

Sedmého roku zemřela korunní svědkyně Anna Solarová; před smrtí se vyzpovídala a s pláčem se přiznala, že ji tíží svědomí; že tehdy u soudu křivě přísahala; že nemůže říci po pravdě, že by ten vrah v okně byl Frank Selvin. Ten dobrák páter s tím přijel ke mně; tehdy už jsem měl lepší rozum o běhu světa, a proto jsem nešel s věcí do novin, nýbrž poslal jsem milého faráře k soudu.

Do týdne byla nařízena restituce procesu Franka Selvina. Do měsíce stál Frank Selvin znova před porotou; nejlepší advokát zadarmo rozdrtil žalobu v prach; nato povstal státní zástupce a doporučil porotcům, aby Franka Selvina osvobodili. A porotci rozhodli dvanácti hlasy, že je Frank Selvin nevinen.

Ano, to tedy byl největší triumf mého života. Žádný úspěch mně nedal tak čisté uspokojení – a zároveň takový jakýsi pocit prázdnотy; abych řekl pravdu, trochu mně začal Selvinův případ chybět – zůstala mně po něm jaksi mezera.

To bylo den po procesu. Najednou přijde holka a povídá, že chce se mnou mluvit nějaký člověk. Já jsem Frank Selvin, řekl ten člověk a zůstal stát ve dveřích; a mně bylo – já nevím, jak bych vám to řekl; pocítil jsem jakési zklamání, že ten můj Selvin vypadá jako... řekněme jako losový agent: trochu obtloustlý a bledý, se začínající pleší, mírně opocený a nesmírně všední; krom toho páchnul pivem.

Slovutný mistře, koktal Frank Selvin (představte si, řekl mi „slovutný mistře!“, já bych ho kopnul!), já vám jdu poděkovat... jako svému největšímu dobrodinci. – Zdálo se, že se tomu učil z paměti. – Vám vděčím za svůj celý život. Všechna slova díků jsou slabá – Ale prosím vás, řekl jsem mu honem, to byla má povinnost; když jsem si jednou byl jist, že vás odsoudili nevinně – Frank Selvin potřásl hlavou.

"Majstro," li diris funebre, "al mia bonfaranto mi ne volus mensogi; la oldulinaçon tamen mi mortigis." "Do ĉe la diabloj," mi eksplodis, "kial vi ne diris tion antaŭ la tribunalo?" Frank Selvin ekrigardis riproĉe en miajn okulojn. "Majstro," li diris, "tion mi ja rajtas; akuzito rajtas malkonfesi, ĉu?" Mi konfesas, ke mi estis konsternita. "Kion do vi volas de mi?" mi abruptis lin. "Mi venas al vi, majstro, danki pro via nobleco," parolis sinjoro Selvin tristvoĉe, kion li opiniis evidente kortuša. "Ankaŭ mian panjon vi protektis. Dio benu vin, nobla bardo!" "Iru," mi ekkriegis furioze; la ulo kuregis de sur la ŝuparo kvazaŭ pafito.

Post tri semanoj li haltigis min surstrate; li estis iom ebria. Mi ne povis seniĝi de li; longe mi ne komprenis, kion li volas, ĝis li eksplikis tion al mi, tenante min je butono. Ĉion mi laŭdire vanigis al li; se mi ne estus tiom skribinta pri lia kazo, la kasacia tribunalo ne preterus la kasacian plendon de lia advokato, kaj li, sinjoro Selvin, ne estus sidinta sep jarojn senkulpe; do nun mi konsideru lian ĝenan situacion, kiun mi kaŭzis per tio, ke mi intervenis en lia proceso - Mallonge, mi devis enmanigi al li kelkajn centojn. "Dio benu vin, bonfaranto," diris fine sinjoro Selvin kun rosplenaj okuloj.

La alian fojon li venis pli minace. Laŭdire mi helpis al mi mem per lia kazo; laŭdire mi akiris gloron nur tiel, ke mi lin defendis, kaj kiel li venas al tio, havi el tio nenian profiton? Neniel mi povis konvinki lin, ke mi ne ŝuldas al li ion kiel kurtaĝon; simple mi pagis denove.

De tiu tempo li aperadis ĉe mi plivere en nelongaj intervaloj; li sidiĝis sur sofo kaj ĝemis, ke li suferas pro rimorsoj, ĉar tiun ĉi oldulinaçon li senvivigis. "Mi iras min denunci, majstro," li diradis morne, "sed por vi ĝi estos tutmonda skandalo. Mi ne scias, kiel atingi trankvilon" –

Aŭdu, la rimorsoj devas esti terura afero, juĝante laŭ tio, kiom mi devis pagi al tiu ulo, por ke li povu ilin plu elteni. Fine mi aĉetis al li bileton al Ameriko; ĉu tie li atingis trankvilon, tion mi ne scias.

Mistre, ŝekl truchlivě, já bych nechtěl svému dobrondinci lhát; já jsem totiž tu babu zabil. Tak u všech všudy, vyletěl jsem, proč jste to neřekl před soudem? Frank Selvin se mi podíval vyčítavě do očí. Mistre, řekl, na to přece mám právo; obžalovaný má právo zapírat, no ne? Přiznám se vám, že jsem byl zdrcen. Co tedy ode mne chcete? vyjel jsem si na něj. Já vám jdu, mistre, jen poděkovat za vaši šlechetnost, mluvil pan Selvin smutným hlasem, který patrně považoval za dojatý. I mé matičky jste se ujal. Bůh vám žehnej, ušlechtilý pěvče! Jděte, zařval jsem bez sebe; chlap letěl ze schodů jako střelený.

Za tři neděle mě zastavil na ulici; byl trochu opilý. Nemohl jsem se ho zbavit; dlouho jsem nechápal, co chce, až mně to vyložil, drže si mě za knoflík. Prý jsem mu to pokazil; kdybych prý nebyl tak o jeho případu psal, byl by odvolací soud přál sluchu zmateční stížnosti jeho advokáta, a on, pan Selvin, by nemusel sedm let nevinně sedět; abych tedy prý vzal aspoň zřetel na jeho stísněné postavení, které jsem zavinil tím, že jsem se vložil do jeho procesu – Zkrátka musel jsem mu strčit nějakou stovku. Bůh vám žehnej, dobrondiče, řekl nakonec pan Selvin se zarosenýma očima.

Podruhé přišel vyhružněji. Já prý jsem si na jeho případu pomohl; prý jsem si získal slávu jen tím, že jsem ho hájil, a jak on k tomu přijde, aby z toho nic neměl? Nemohl jsem ho nijak přesvědčit, že mu nejsem dlužen cosi jako provizi; prostě platil jsem znovu.

Od té doby se u mne objevoval spíše v kratších přestávkách; sedl si na sofa a vzdychal, že trpí výčitkami svědomí za to, že tu babu odkrouhnul. Já se jdu udat, mistre, říkal zasmušile, ale pro vás to bude světová ostuda. Tak já nevím, jak bych došel klidu. –

Poslouchejte, tyhle výčitky svědomí musejí být strašlivá věc, mámlí soudit podle toho, co jsem se tomu chlapovi naplatil, aby je mohl dále snášet. Nakonec jsem mu koupil lístek do Ameriky; došel-li tam klidu, to nevím.

Tio do estis la plej granda sukceso de mia vivo; junaj amikoj, kiam vi verkos nekrologen pri Leonardo Unden, skribu, ke per kazo de Selvin li engravuriĝis per oraj literoj kaj tiel plu; li havu eternan dankon.“

Tak to byl ten největší úspěch mého života; mladí přátelé, až budete psát nekrolog na Leonarda Undena, napište, že Selvinovým případem se vryl zlatým písmem a tak dále; bud' mu věčný dík.”